ISSN 0023-3692

# KONTAKTO

numero 152 (1996:2)

Malfacila temo:
**KIAL SENTI SIN KULPA?**

# KIEL EKESTIS ĈIO?



La malnova scienco:
**Astrologio**

**PLENE FACILA NUMERO!**

| | | |
|---|---|---|
| Kial senti sin kulpa? | Nikola Markarian, Britio | 2 |
| Kiel travivi malbonan tagon | trad. Zoran Ćirić, Serbio | 3 |
| Kiel ekestis ĉio? | Sven Walper, Germanio | 4 |
| Krucvorto | Keyhan Sayadpour, Irano | 6 |
| Komputiloj en la ĉiutaga vivo | Benjamin O. Commey, Ganao | 6 |
| Kial simioj loĝas sur arbo? | Ampomah Badu Frempong, Ganao | 6 |
| Astrologio: kiam la steloj parolas | Nury Armanda Verdes Suárez, Kubo | 8 |
| La reveno de Ramseso la 2-a | Sophie Boukhari | 10 |
| Verdaj folioj por Azio | David Lazarus, Japanio | 10 |
| Nuntempaj kuracistoj | Liu Xiaozhe, Ĉinio | 11 |
| La lingvo de la okuloj | Ulrich Matthias, Germanio | 12 |
| Apartaĵoj | Irina Aleksejeva, Rusio | 14 |
| La bona ingo | | 14 |
| Tentaklo | | 15 |
| Akvofalo | Delci Cipriani, Brazilo | 16 |



**Dumonata socikultura gazeto de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), eldonata de Universala Esperanto-Asocio (UEA)**

**Fondita** en 1963

**N-ro 152** (1996:2), 33-a jarkolekto

**ISSN** 0023-3692

**Legata** en 90 landoj

**Adreso:** UEA, Nieuwe Binnenweg 176
NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando;
✆ +31 10 436 10 44
℻ +31 10 436 17 51
uea@inter.nl.net

**Redaktoro:** Francisco L. Veuthey

**Konstantaj kunlaborantoj:**
Irina Aleksejeva (Rusio)
Felip Artero i Lozano (Katalunio)
Zoran Ćirić (Serbio)
Alberto García Fumero (Kubo)
Bernard Golden (Hungario)
Claus Günkel (Germanio)
Ulrich Matthias (Germanio)
Kizeyidioko Mayinda (Zairio)
Atilio Orellana Rojas (Argentino)
Ọ̀ṣọ̀-Davies Olúwábùnmi (Niĝerio)
Anna Rachoń (Pollando)
Ŭatanabe Kei (Japanio)

**Grafika elpretigo:** Roy McCoy

**Provlegado:** Rob Moerbeek


**Presado:** Grafisch Bedrijf Tuijtel

**Facillingvaj artikoloj** estas verkitaj en la niveloj *tre facila* kaj *facila*, laŭ la vortolisto de KONTAKTO. Tiu listo aperas en la unua numero ĉiujara.

**Anonctarifo:**
Tutpaĝa 780 gld., duonpaĝa 430 gld., kvaronpaĝa 240 gld., sesonpaĝa 185 gld., okonpaĝa 130 gld. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Senŝanĝe ripetita anonco (ne anonceto!) en sinsekvaj numeroj rajtas je rabato de 20%. Por movadaj instancoj: 50% rabato. Varbantoj de ekstermovadaj anoncoj ricevas maklerajon de 30% el la prezo de la koncerna anonco.
La abontarifo varias laŭlande.
Petu informojn de la supra adreso.

Malfortvidantoj povas ricevi voĉlegitan eldonon senpage. Sendu du 60-minutajn kasedojn al Elise Lauwen, Neerstraat 165, NL-5215 AP 's-Hertogenbosch, Nederlando.



## enkonduko

*Mi tre ĝojas, ke fine eblas kunmeti numeron plene facilan! Vi vidos, ke per limigitaj vortaro kaj lingvaj reguloj vere eblas skribi pri interesaj temoj. Kiam vi verkos tiel? En la dorskovrilo de nia pasinta numero vi povas legi konsilojn pri tio. Aliflanke, ankaŭ nefacil-lingvaj kunlaboraĵoj estas daŭre atendataj!*

*Ni adiaŭas la serion pri sekura seksumado La bona ingo, kiu estis kun ni laŭlonge de 10 numeroj — preskaŭ du jarojn!*

*Gratulon al Sascha Ralf Gion Fröhlich — la knabo, kies fotoj ilustris la artikolon pri radio de n-ro 150, 1995:6. Post brila aktivado en la Komisiono pri Eksteraj Rilatoj de TEJO, komence de marto li elektiĝis prezidanto de la Eŭropa Kunordiga Buroo, plej supera organizaĵo de junularaj asocioj (ĝenerala, ne-esperantista!) en tuta Eŭropo. Bonege, Ralf!*

*Se vi opinias, ke la facil-lingvaj artikoloj kaŭzas kapdoloretojn al vi, ne tro timu: vi jam legis ĝis tie ĉi kaj tio ne okazis, ĉu ne? Ĉiuokaze, la tentaklaĵojn kaj anoncojn ni lasis en ne-facila lingvo.*

*Facilan legadon!*


Franjo

# Kial senti si

**Ekzistas temoj, kiujn volonte ni flankenmetas. Priparoli ilin, tamen, povas esti bona maniero komenci superi ilin.**

Dum universitata studlaboro en la franca urbo Liono mi vizitis la faman muzeon "La Résistance" kune kun kelkaj germanaj kunstudantoj. Ni eniris gaje interparolante sed, kompreneble, elvenis tute silente kaj malĝojaj. La ekspozicio estis ege miriga kaj pensiga.

Kvankam estas jam tre konataj la teruraĵoj faritaj sub la Tria Regno*, vidi denove la kruelan manieron en kiu oni traktis homojn, simple pro ilia raso*, neniam ĉesos frapegi min. Denaska esperantistino kun gepatroj de diversaj naciecoj trovas ege malfacila kompreni tian rasistan malamon.




Post nia vizito al la muzeo mi komencis diskuti kun miaj amikoj pri tio kion ili, kiel germanoj, sentis pri la ekspozicio, kaj pli ĝenerale pri la Dua Mondmilito. Kvankam ili ĉiuj naskiĝis longe post la fino de la milito, mirigis min, ke ili ĉiuj sentas sin iom kulpaj pro tio, kion faris Hitlero kaj la nazioj*. Kelkaj diris, ke ili estis edukitaj pensi tiamaniere. Mi demandis min, ĉu ili vere devus senti sin kulpaj pro io super kio ili havis nenian regon?

## La kialoj

Unu klarigo por la daŭra kulpo-sento estis, ke ne sufiĉe da nazioj estis punitaj post la milito, ekzemple dum la nurenberga juĝado. Oni opinias, ke tiuj, kiuj suferis, aparte judoj*, ne sentas sin sufiĉe venĝitaj* se la germana popolo ne kulpigas sin mem pro la genocido*. Bedaŭrinde mankas al mi kontaktoj kun judoj por vere demandi ilin pri ilia vidpunkto sed mi klopodis imagi, kiel pensus homoj, kiuj troviĝas en koncentrejo*. Ĉu ilia malamo ne estus pli forta por la unuopulo, kiu tenas pafilon* kontraŭ ili kaj por ties superuloj,




**Ĉu Kontakto plaĉas al vi?**

**Se jes, ne kontentiĝu legi la ekzempleron de via klubo aŭ instruisto — abonu ĝin mem! Se vi estas kursgvidanto, faru kolektivan abonon kun 20% rabato por via lernantaro (sufiĉas nur 6 ricevantoj). Se ni sendas ĉiujn ekzemplerojn en unu pako al unu adreso, la rabato estas 40%! Kaj, se temas pri grandaj grupoj, ni povas interkonsenti eĉ pri pli favoraj rabatoj! Skribu al ni!**

ABONTARIFO 1996

| | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| Aŭstralio | 31 | dolaroj | Francio | 125 | frankoj | Nederlando | 41 | guldenoj |
| Aŭstrio | 245 | ŝilingoj | Germanio | 37 | markoj | Norvegio | 150 | kronoj |
| Belgio | 765 | frankoj | Hispanio | 2300 | pesetoj | Pollando | 20 | guldenoj |
| Brazilo | 20 | guldenoj | Israelo | 32 | guldenoj | Portugalio | 2500 | eskudoj |
| Britio | 16 | pundoj | Italio | 34000 | liroj | Svedio | 185 | kronoj |
| Danio | 150 | kronoj | Japanio | 2880 | enoj | Svislando | 31 | frankoj |
| Finnlando | 115 | markoj | Kanado | 31 | dolaroj | Usono | 23 | dolaroj |

# n kulpa?

facila

——— *Nikola Markarian, Britio*

ol por popolo, kiu plejparte ne sciis la tutan veron aŭ ne povis kredi tion, kion ili aŭdis. Tio ĉi estas sufiĉe komprenebla se oni konsideras la propagando*-sperton de Hitlero kaj la fakton, ke post la milito eĉ la venkintoj ne povis tute kredi la malkaŝitan kruelecon de la malamiko.

Rimarko, kiun faris unu amiko pri la situacio en Germanio, sufiĉe maltrankviligis min. Li diris, ke li timas, ke la daŭra sentigo de kulpo, rilate al tio, kion faris Hitlero kontraŭ judoj, iel malpermesas al la germanoj neŭtrale trakti la problemojn inter Israelo kaj la arabaj landoj, kaj eĉ povus esti kaŭzo por malamikeco kontraŭ araboj kaj islamanoj. Politika kritiko* kontraŭ la juda ŝtato tre malfacilas. Simile germanoj havas malfacilaĵojn kritiki agojn kontraŭ homaj rajtoj, ekzemple la genocidon en Bosnio, ĉar ili timas aŭdi reagon kiel "kompare al tio, kion *vi* faris pasintece, tio estas nenio!" Kompreneble la timo aŭdi tiajn rimarkojn ekzistas sur ĉiuj niveloj de internaciaj rilatoj.



## Senti sin kulpa


Persone mi ne pensas, ke junaj germanoj devus senti sin kulpaj pro la naziaĵoj de la pasinteco, sed nur, ke ili estu edukitaj — same kiel ĉiuj aliaj en la mondo — pri tiuj krimoj por ke oni evitu la ripeton de tia homa koŝmaro*. (Ĉu eble la problemo estas diferencigo inter la du aspektoj?.) Se ili daŭre sentas sin kulpaj, ĉu tio ne signifas, ke iu daŭre kulpigas ilin — ĉu la milit-suferintoj, ĉu la internacia komunumo*? Eble tio en si mem kaŭzas malamikecon?

Ĉu kiel brito mi devus senti min kulpa pro, ekzemple, la terura amas-mortigado en Punjab, Hindio, en la fino de la kolonia* periodo? Mi ne volas, ke homoj pensu, ke mi iel ajn partoprenis en la decido mortpafi amason da civiluloj*, do kial mi sentu min kulpa aŭ malpli kapabla kritiki amas-mortigojn en Ruando aŭ Bosnio?

Mi forte esperas, ke la novaj germanaj gejunuloj baldaŭ povos senigi sin de sia politika limiĝo kaj libere esprimi sin same kiel ĉiuj aliaj en la mondo. Kion vi opinias? ❑


**Kontakto — Jarkolekto 1995**


**Se vi ne ricevis nian revuon pasintjare, vi povas ankoraŭ aĉeti unuopajn numerojn!**



**145** *(1995:1)*
La alia flanko de artefarita fekundigo. Naciaj renaskiĝoj, aparte pri Mez-Azio. Slangoj de la krokodila familio. Mistera Tiaŭanako. Unua "babilaĵo" el serio de 3: *Meztulepramismo.*



**146** *(1995:2)*
Polemikeca *Monstroj ĉirkaŭas vin* pri rifuĝintoj en Eŭropo. Facillingva ĉefartikolo! La lingvo de surduloj kaj Gestuno kiel internacia gestolingvo. 100-a datreveno de Andreo Cseh.



**147** *(1995:3)*
Okaze de la 50-jariĝo de UN Ralph Harry, eksambasadoro de Aŭstralio en UN, rakontas tra sia vivosperto la historion de la plej supera tera organizaĵo. Nemalhavebla numero!



**148** *(1995:4)*
La brazila "bovamuzego". Vojaĝo tra Interna Mongolio. Aidoso: kial morti anstataŭ uzi preventilojn? La utiloj de tabako. Toleremo: ĝis kiuj limoj? La nova generacio de Disney-filmoj.



**149** *(1995:5)*
Ovodemetanta homaro. Mirinda superrigardo al la 100 jaroj de kino. Kristnaskaj kutimoj en malnova Rusio. Krimoj de pseŭdoframasonismo en niĝeriaj lernejoj. *La ĝisostulo.*



**150** *(1995:6)*
Formulo ebligas feliĉon. La 100 jaroj de radio. La postkulisaĵojn de la videokurso *Mazi* montras ties reĝisoro. La lasta rusa cara familio. El *Taglibro de Anne Frank*, je 50 jaroj de la militfino.

**Unuopa n-ro kostas 4 gld. Se vi mendas la tutan kolekton (6 n-roj), vi pagas nur 18 gld. Se minimume 3 kompletojn, vi ricevas rabaton de 1/3 kaj sekve pagas nur po 12 gld.!**


La prezoj inkluzivas sendokostojn. Por EU-landoj aldoniĝas 6% por imposto. Mendu ĉe UEA.


**civilulo:** simpla loĝanto de ŝtato
**genocido:** neniigo de tuta popolo
**judo:** Izrael-ido
**kolonio:** aro da samnacianoj loĝantaj en ali-nacia loko
**komunumo:** la tuta loĝantaro; la tuta socio
**koncentrejo:** ejo, kie oni kolektas homojn por savi aŭ por puni ilin
**koŝmaro:** teruraĵoj, kiujn oni povas "tra-vivi" dum dormado
**kritiko:** elmontri ies mankojn
**nazio:** sekvanto de Hitlero
**pafilo:** ĵet-ilo por mortigi
**propagando:** klopodado por disvastigi ideon
**raso:** granda hom-familio
**regno:** pova ŝtato
**venĝi:** pagi malbonon per malbono

## Kiel travivi malbonan tagon

facila

Multaj travivis jenan rakonton: vek-horloĝo senpardone sonadas kaj en la kapo vi sentas nur doloron kaj malplenon. Malgaja pro ellitiĝo, oni devas iri al la laborejo, lernejo... En tiaj okazoj provu jene: Bone matenmanĝu. Se kafo ne plaĉas al vi, trinku sukon aŭ glason da minerala* akvo. Aŭ eble teo estas pli bona. Poste, ek al banado: uzu varman kaj malvarman akvon, denove tiun kaj tiun ĉi, ree kaj ree — se vi estas sana, kompreneble. Finu la banon per *malvarma* akvo — tio plibonigas la trairadon de la sango.



Post ĉio ankoraŭ kelkajn ekzercojn apud malfermita fenestro, kaj vi sentos vin pli bone.

El la ŝranko ne prenu kion ajn, kiam vi ne sentas vin gaja: bela vestaĵo povas helpi.

Tia tago ne estas taŭga por malfacilaj laboroj. Se vi povas, nepre lasu ilin por poste.

Vespere enlitiĝu pli frue, prenu iun bonan libron kaj... atendu pli bonan morgaŭon!

*(Esperantigis Zoran Ćirić, Serbio)*

**minerala:** el la tero, ŝtonoj
**suko:** "akvo", ĝenerale el plantoj, fruktoj

Homoj ĉiam miris pri la mondo: pri ĝia grandeco kaj bona funkciado, pri la multegaj specoj de plantoj kaj bestoj, pri la ĉielo kaj ĝia nenombrebla stelaro. Eĉ en tre fruaj kaj simplaj kulturoj, homoj jam havis imagojn, kiel ĉio tio estiĝis. Multaj el la malnovaj rakontoj pri la estiĝo de la mondo ŝajnas al ni strangaj. Eble ni ridetas pri ili, ĉar ni nuntempe ja "scias", kiel la mondo estiĝis:

Laŭ nuntempa scio de sciencistoj, la mondo estiĝis antaŭ 15 aŭ 20 miliardoj da jaroj. Ĝi komenciĝis per grandega dispeciĝo, kiun oni nomas "granda krevo*" aŭ "pra-krevo". Estis varmege kaj senorde. Ekde tiam, la materialo pli kaj pli malproksimiĝis, malvarmiĝis kaj ordiĝis. Tiel estiĝis la multegaj disaj steloj; tiel ankaŭ estiĝis nia tero. La tero pli kaj pli malvarmiĝis; materialo sur ĝi ordiĝis tiel, ke ĝi fariĝis tre simplaj vivantaj estaĵoj. Tiuj dum longa tempo ŝanĝiĝis al pli grandaj plantoj kaj bestoj. Tiuj ĉi plu ŝanĝiĝis, kaj fariĝis la nuntempaj plantoj kaj bestoj kaj homoj. Tion ni lernas en lernejo; tion ni legas en faka literaturo. Sed kiel oni eltrovis ĉion tion? Dum la okazado mem ja neniu ĉeestis! Per kiaj metodoj sciencistoj eksciis pri ĝi? Kaj kiom certa estas tiu scio?

## KIEL SCIENCO FUNKCIAS

Aŭdante la vorton "*sci*enco", oni povas supozi, ke en ĝi temas pri tute certa "scio". Sed tute ne estas tiel. Sciencistoj ne laboras pri certa scio, sed pri malcertaj teorioj. Ili mezuras kaj rigardadas kaj esploras. Tiel ili ekhavas informojn pri la mondo. Poste ili provas fari teorion el tio. Povas okazi, ke postaj esploroj donas novajn informojn, kiuj kontraŭdiras al la teorio. Tiukaze oni ekscias, ke la teorio estis malĝusta. Oni devas aŭ plibonigi aŭ forĵeti ĝin. Povas ankaŭ okazi, ke postaj esploroj donas novajn informojn, kiuj subtenas la teorion. Per tio, la teorio fariĝas pli kredinda. Sed oni neniam povas esti tute certa pri ĝi. Per scienco oni neniam tute certe scias ion. En plej bona kazo oni povas ricevi tre kredindan teorion, kiu estas preskaŭ, sed ne tute certa. Do, kiom kredinda estas nia teorio de prakrevo? Kiom certe ni jam scias pri la estiĝo de la mondo?

## APARTAJ MALFACILAĴOJ

Kosmologio (tiu scienco, kiu okupiĝas pri la estiĝo de la mondo) ja havas siajn specialajn problemojn: Unua problemo estas, ke ĝi temas pri pasinteco, pri historio: Ni ne povas rekte esplori la pasintecon, ĉar ĝi estas pasinta! Ni nur povas esplori la mondon, kia ni vidas ĝin *hodiaŭ*; poste ni devas pensadi kaj supozi, kiel ĝi povis fariĝi tia. Neniu homo ja ĉeestis, kiam la mondo estiĝis. Ekzistas neniuj rakontoj aŭ skribaĵoj de homoj, kiuj mem vidis. Dua problemo estas, ke eĉ en la mondo de hodiaŭ, plej multon ni ne povas vidi! Eĉ per plej modernaj teleskopoj* steloj aspektas nur kiel senfine malgrandaj punktetoj. Ni ne povas vojaĝi al ili, ne scias ilian formon, ni nur povas ekzameni la lumon de tiuj punktetoj. Malhelajn aĵojn, kiuj ne dissendas lumon, ni tute ne povas vidi. Sed oni supozas, ke plej multa materialo en la universo* estas malhela! Do ni vere vidas tre malmulton.

## KIEL TAMEN ONI EKSCIIS IOM

Ĉar la informoj estas malmultaj, oni devas multe teorii por ekscii ion interesan pri la universo. Oni rimarkis, ke la lumo de steloj estas iom ruĝiĝinta. Supozeble tio estas ĉar la steloj malproksimiĝas de ni. De kelkaj, la lumo estas tre ruĝiĝinta; oni supozas, ke ili tre rapide malproksimiĝas. De aliaj, la lumo estas malmulte ruĝiĝinta; oni supozas, ke ili nur malrapide malproksimiĝas. Ĉar ŝajne ĉiuj steloj malproksimiĝas, oni supozas, ke iam en fora pasinteco ili ĉiuj disiĝis de unu sola punkto. Kaj tiu disiĝo estis la prakrevo. Tiel ĉi estiĝis la teorio pri ĝi.

Ankaŭ nur per la ruĝiĝo de stel-lumo oni eltrovas, kiom malproksimaj estas foraj steloj: Per la ruĝiĝo oni kalkulas ilian rapidecon, kaj konsiderante la tempon inter la prakrevo kaj nun, oni kalkulas kiom malproksimen ili povis flugi dum tiu ĉi tempo je tiu ĉi rapideco. Oni scias, ke lumo iras kun certa, ĉiam sama rapideco. De proksimaj steloj ĝi iras kelkajn jarojn; de malproksimaj steloj ĝi verŝajne iras milojn aŭ milionojn da jaroj. Do oni supozas, se ni rigardas tre malproksiman galaksion*, ni vidas ĝian lumon, kia ĝi estis elsendita antaŭ multegaj milionoj da jaroj. Ni do povas vidi tre foran pasintecon de tiu galaksio! Se poste ni rigardas galaksion iom pli proksiman, ni vidas pasintecon ne tiom foran. Se ni sekve rigardas galaksiojn kaj stelojn pli kaj pli proksimajn, ni tiel vidas la tutan historion de la universo, ekde la prakrevo ĝis nun. Per ekzamenado de la stel-lumo oni ankaŭ povas ekscii, el kiu materialo la aĵoj konsistas.

## FAKTOJ, KIUJ DUBIGAS

La teorio ŝajnas bonega, sed bedaŭrinde estas pluraj problemoj je ĝi. Per novaj esploroj oni eltrovis detalojn, kiuj ŝajne kontraŭdiras al la teorio: Per novaj, precizegaj mezuradoj de la ruĝiĝoj oni trovis, ke ŝajne ili estas *kvantumitaj*! Tio signifas, se oni kalkulas malproksimecon per ili, ke galaksioj troviĝas en regulaj ŝtupoj, kaj inter la ŝtupoj estas nenio. Sed tio ŝajnas tute strangega kaj malebla! Do oni supozas, ke eble la ruĝiĝo estas pli malfacila afero. Eble oni ne povas simple kalkuli rapidecojn kaj malproksimecojn per ĝi. Sed la tuta teorio estas bazita sur tiu kalkulo, do oni havas gravan problemon. Alia problemo estas, ke eĉ tre malproksimaj galaksioj ŝajnas tre maljunaj. Se ni vidas la lumon, kiun ili dissendis antaŭ multegaj milionoj da jaroj, ni devus vidi ilin tre junaj, kiaj ili estis mallonge post la prakrevo. Sed laŭ ilia lumo, ŝajne estas materialo en ili, kiu povas estiĝi nur dum longa tempo. Tial ili ŝajnas pli maljunaj ol la universo mem! Sed tio estas stultaĵo, do oni havas ankoraŭ gravan problemon.

Estas ankoraŭ aliaj eltrovaĵoj, kiuj kaŭzas gravajn problemojn en la teorio de prakrevo. Mankas loko tie ĉi por priskribi ĉiujn. Ni devas lerni el ĉio ĉi, ke ni ne vere multe kaj certe scias pri la estiĝo de la mondo. Nia ideo de prakrevo estas grandega teorio. Ĝi estas fondita sur malgrandega informaro kaj iom pridubindaj supozoj. Ĝi ankoraŭ ne estas tre certa; oni devos ankoraŭ multe plibonigi ĝin. Eble oni eĉ foje devos forĵeti ĝin. Eble la mondo estiĝis tute alie kaj la pranepoj ridetos pri ni, ĉar ni kredis je prakrevo. ❑



**Sven Walper** naskiĝis en 1970, lernis Esperanton en 1988, studis ekonomi- kaj komputil-sciencon kaj nun laboras kiel programisto. Ŝate li okupiĝetas pri i.a. muziko, lingvoj, religio kaj iomete da kosmologio.



facila

# KIEL EKESTIS ĈIO?!

Sven Walper, Germanio

**galaksio:** grandega aro de miliardoj da steloj. Nia *galaksio* nomiĝas Laktovojo.
**krevo:** subita rompiĝo pro interna prem-fortego
**teleskopo:** granda ilo por rigardi malproksimen
**universo:** tutaĵo de ĉio, kio ekzistas


En *PRI NIA UNIVERSO* (Komp. Li Qiang, trad. Liu Caisheng. Pekino: ĈEE, 1992. 112p. 18cm. 5,10 gld. ĉe la Libroservo UEA) vi povas trovi pli pri astronomio, ĉefe pri nia sunsistemo. La furora *TRAGEDIO EN LA UNIVERSO* (La junaj astronomoj-esperantistoj. Zagreb, 1961) estas elĉerpita, sed eble vi povas trovi ĝin en biblioteko aŭ brokantejo.

# Krucvorto

*facila*

— *Keyhan Sayadpour, Irano*

***Sendu vian solvon al nia redaktejo antaŭ la <u>30-a de septembro 1996.</u> Vi povas gajni la libron* PRI NIA UNIVERSO. *Rapidu!***



**Horizontale *(= Kuŝe)***

1. Ĉirkaŭmov' — Ne plu valida
2. Dumonata socikultura gazeto
3. Mov' antaŭen
4. Ar' (ĉe numeroj) — Plej bela sento (pluraj) — 16-a litero
5. Plej posta (sen finaĵo) — Utiligos
6. Ĝustaloke — Maltag'
7. 21-a litero — Ĵusa — Iu afero
8. Tiu viro
9. Kreis la plej sukcesan planlingvon
10. Havigi ion al iu(j) — Ne la sama

**Vertikale *(= Stare)***

1. Ruĝo, verdo ks
2. E-aranĝo — Duopo — Post v
3. Itala ĉefurb' — Sed... sed sen e — Homa prenil'
4. 18-a litero dufoje — Greka ĉefurb' — Unua persono
5. Sent' ĉe danĝero — Kuiril'
6. Grupo — "Gajiga" trinkaĵ'
7. Komenc' — Nova — El-spireto
8. Kaj tiel plu — Litero kiel en *Vertikale 2* — Part' sub kapo
9. 22-a litero — Meti — Malbon'
10. Elspezoj

# Komputiloj en la ĉi

La homaro bezonas pli bone kaj facile produkti aferojn en malpli da tempo, kun sukceso. Tiu bezono igis la homon ekkonstrui komputilojn*. De la unuaj grandegaj, kiuj bezonis tutajn ĉambrojn, ĝis la nunaj etaj, kiuj facile eniras eĉ poŝon*, komputiloj pli kaj pli fariĝas kunuloj en la ĉiu-taga vivo.

Komputiloj nun faciligas ĉiujn homajn laborojn. Kuracistoj* ne plu bezonas kontaktiĝi kun ĉiuj malsanuloj, nek plu librotenistoj skribegas dum tago kaj nokto. Eĉ komunikistoj* kapablas interparoligi samtempe multajn homojn en disaj lokoj pere de komputilo, kaj eĉ bildistoj ne plu uzas krajonojn* kaj kolorigilojn. Uzante komputilojn la laboristoj ricevas multan tempon por pripensi aliaĵojn.

Aliflanke, komputiloj kaŭzas labor-eksiĝon kaj senlaborecon, ĉar hodiaŭ kvar homoj kapablas per komputilo subteni oficejon, kie antaŭe oni laborigis dek kvin homojn. Ege multaj materialoj* senuziĝas kaj ties produktistoj malaperas. Tamen, pli kaj pli da spertuloj pri komputiloj estas serĉataj kaj la laborkostoj malaltiĝas.

# Kial simioj loĝas sur

*facila*

Antaŭ multaj jaroj ĉiuj bestoj loĝis kune en granda, riĉa arbaro. La bestoj loĝis sen batali, amikece, frate kaj pace en la praarbarego. La mangaĵoj estis multaj kaj la ĉirkaŭaj riveretoj estis pli ol sufiĉaj por trinkado kaj banado. Ĉiuj kulturis saman kampon. Ili faris ĉion kune kaj ĉio estis bona.

En iu tago malbonaĵo okazis en la paca, amoplena, amikeca loĝejo de la bestoj. La feliĉo finiĝis, ĉar Kato mis-agis kontraŭ Muso*. Kaj, ĉar tiam neniu estis proksime por malhelpi, Kato mortigis Muson. Kiam oni informis la teruraĵon al aliaj bestoj, ili malĝojis kaj ploris dum du tagoj pro ilia bonkora amiko Muso. Post la en-ter-igo de Muso ili ekserĉis Katon pro lia fi-ago. Sed iom post iom tiu ideo forgesiĝis, ĉar Kato kaŝis sin ie kaj neniu trovis lin.

Du semajnojn poste la tuta loko de la bestoj trankviliĝis. Tiam Muŝo* ekflugis el sia domo por viziti Elefanton*. Post la bon-ven-igo de Elefanto, ili parolis pri la okazinta afero. Muŝo la Saĝa opiniis: "Estus bone se ni havus reĝon, kiu solvu niajn problemojn". "Jes, bona amiketo", respondis Elefanto, "estus bonege se ni reĝigus iun". Tiun saman vesperon Elefanto iris al Tigro*, Leono* kaj aliaj grandaj bestoj por diri al ili pri la ideo de Muŝo la Saĝulo. Tigro estis sendita de domo al domo informi pri la kunveno. Starante, li diris: "Bonaj gefratoj, venontan dimanĉon estos plej granda kunveno de ĉiuj bestoj. Venu, venu! Vin ni atendas!"

Je tiu dimanĉo la bestoj kunvenis sub la plej granda arbo en la loĝejo. Elefanto bonvenigis ilin per jenaj vortoj: "Gefratoj, mi kore dankas pro via ĉe-esto en tiu ĉi kunveno! Ni certiĝis pri la malboneco de iuj el ni. Fakte nia nuna sento estas malamo. Kial Kato devis mortigi Muson? Kial, kial? La amo nun kuŝas for de ni. Bonvolu doni ĝustan solvon!" Ĉiuj bestoj silentis dum




— *Ampomah Badu Frempong, Ganao*

tre facila

# ...utaga vivo

*...enjamin O. Commey, Ganao*

Ja, ĉiu homa el-pensaĵo havas kaj bonan kaj malbonan flankojn. Certe nenio estas perfekta* kaj komputilo ne estas apartaĵo en tiu regulo. Kontraŭ tiu ĉi antaŭen-paŝo, kiu trairas ĉiujn landojn, kaj riĉajn



kaj malriĉajn, la mondo havas nenion fareblan krom akcepti. Komputiloj estas ĉe ni, kaj ni devas lerni kunekzisti kun ili.

*(Tiu ĉi teksto estis verkita kiel skriba tasko por ekzameno de ILEI/UEA.)*

**komuniki:** fari ion komuna inter si kaj alia homo, konigante ĝin al li
**komputilo:** aparato, kiu povas helpi en plej diversaj laboroj
**kuracisto:** san-igisto
**materialo:** ĉia aĵo, el kiu la homa laboro produktas ion
**perfekta:** bonega kaj sen-manka
**poŝo:** saketo de vesto por etaj aĵoj

# ...rbo?

kelkaj minutoj. Poste Leopardo* ripetis la ideon de Muŝo: "Oni diris, bona frato, ke estus bone se ni reĝigus iun bonan beston, kiu povos solvi ĉiajn miskomprenojn kaj batalojn inter ni". Bovo al-donis: "Mi havas la ĝustan manieron por elekti la reĝon! Ni kantos, ludos muzikon kaj dancos. La besto, kiu plej bele dancos, estos nia reĝo!" Tigro diris: "Liaj eldiroj estos nia devo." Kaj ili decidis la tagon, en kiu ili elektos reĝon. Ĉiuj bestoj estis feliĉaj pro la bona rezulto.

Nun la ĉefa okupo por ĉiuj iĝis la prov-ludoj je dancado, ja ĉiu deziris esti reĝo! Kaj la elektotago alvenis: Ŝafo ludis tamburon*, kaj Koko* kaj aliaj birdoj kantis post la malfermo. Jena estis la kanto de Koko:

*"Bra besaŭ!"*
*"Bra besaŭ!"*
*"Bra besaŭ!"*

kio signifas "Venu kaj dancu!" Kaj la birdaro kantis jenon:

*"Mesaŭ bi!"*
*"Mesaŭ bi!"*
*"Mesaŭ bi!"*

kio signifas "Mi tuj dancos!"

Dum la kantado la bestaro staris en rondo kaj unu post la alia ili dancis. Serpento* dancis kaj dancis, sed li ne sciis danci bele. Jen la vico de Muŝo, kiu multe dancis, sed ankaŭ ne sukcesis. Ankaŭ Tigro dancegis. Multaj bestoj dancis tre malbele. Venis la vico de Simio*. Simio dancis... treege bele! Kiam li finis sian dancadon, ĉiuj bestoj ĝoj-kriis kaj elektis lin reĝo: "Vivu nia Reĝo!" La estr-aro informis, ke Simio estas la reĝo de ĉiuj bestoj kaj, ĉar li devas bone vidi ĉiujn okazaĵojn sur la tero, li devos loĝi sur arboj.

De tiam Simio, kiel reĝo, loĝas sur arboj. ❑

**elefanto:** afrika/azia bestego kun longa nazo
**koko:** hejma birdo, kiu matene vekas nin per kanto
**leono:** granda afrika kat-besto
**leopardo:** afrika/azia katego
**muso:** malgranda besto mal-utila, kiun katoj ŝategas kapti
**serpento:** longa sen-pieda danĝera besto
**tamburo:** muzikilo, kiun oni ludas per frap-ado
**tigro:** afrika/azia kat-ego, plej simila al katoj



# anonctabulo

TARIFO: 0,50 gld. por ĉiu vorto. Tri internaciaj respondkuponoj por dek vortoj.

**Deziras korespondi** Jorge Soto Pérez, calle 10 e/ 29 y 31 edf. 14 apt. 2, CU-42700 Pedro Betancourt, Matanzas, Kubo.

**18-jara fraŭlino** deziras korespondi tutmonde: Eloah Corrêa, Rua Heráclito Graça 347 Bl. 03 Ap. 303, BR-20725-080 Rio de Janeiro - RJ, Brazilo.

**Turismaj entreprenoj,** grupoj aŭ individuoj interesiĝantaj pri turismo en Tanzanio, bonvolu kontakti en E-o aŭ angla (aldonante 2 irk-ojn por respondo) s-ron Sylivester N. Nyinyimbe, P.O. Box 147, Bunda, Tanzanio.

**15-jara** mezlernejano interesiĝanta pri E-o, angla, germana kaj indianaj lingvoj, filatelo kaj numismatiko serĉas kontaktojn tutmonde. Ivan Ĉega, s. Subbotino 18/2, Ŝuŝenskij rajon, RU-662736 Krasnojarskij kraj., Rusio.

**20-jara** komencanto deziras korespondi tutmonde: Mechak Ezin, B.P. 753, Parakou, Benino.

**26-jara fraŭlo** deziras korespondi tutmonde: José Roberto de Souza, Av. N. S. Copacabana 245/509, BR-22020-031 Rio de Janeiro - RJ, Brazilo.

**Informu pri vi** rusiajn labor-donantojn! Sendu sinprezenton kaj 20 internaciajn respond-kuponojn al: a/ja 27, RU-192281 Sankt-Peterburg, Rusio.

**21-jara** ŝatanto de kino, teatro kaj muziko instruas Esperanton al infanoj kaj deziras konsilojn pri tio. José de J. Campos Pacheco, calle 10 # 29 y 31, piso 3 escl. 2908 apt. F-6, CU-42700 Pedro Betancourt, Matanzas, Kubo.

**Kunfondinto** de kultura-ekologia societo interesiĝanta ankaŭ pri amerikaj indiĝenoj, deziras korespondi: José Antônio Cardoso, R. Lázaro Jacinto Gomes 55, BR-75210-000 Palmelo - GO, Brazilo.

**Kvar studentinoj** deziras korespondi tutmonde en Esperanto:

- 18-jara Parastu Zade-shiry, No 3, Paydar Lane, Jafari Str., Mahdieh Avenue, IR-65177 Hamedan, Irano.
- 19-jara Maryam Ansarian, No 5700 Aal-e-ahmad Lane, Park (Sh. Ahadi) Street, IR-65718 Malayer, Irano.
- 20-jara Leila Musavy, No 131, Khatam Lane, Daneshgah Jonubi Str., IR-69156 Borujerd, Irano.
- 25-jara Shahnaz Zayerchi, No 35, Fotovat 4, Hejrat 4 Lane, Ali-abad, IR-69178 Borujerd, Irano.

# Astrologio: kian


**Astrologio estas ne nur malnovega scienco, sed ankaŭ fonto de aliaj sciencoj. Nury A. Verdes Suárez el Kubo klarigas.**

Kiam homo naskiĝas, li tuj ricevas influon* de la ĉielaj korpoj pro la loko, kie ili troviĝas rilate al la Tero en tiu momento. Ekde tiam eblas diri: tiu homo estas *Ŝafo*, *Taŭro*, ktp.

Ĉiu signo havas planedon*, kiu estas ĝia reganto kaj donas al la personoj, kiuj naskiĝis sub ĝia influo, multajn ecojn, ekzemple la manieron agi, la volon, inteligenton, emojn kaj aliajn — dum la tuta vivo. Kompreneble, oni devas labori favore* al la donacoj ricevitaj de sia reganto por ek-havi pli bonan rezulton por si kaj siaj rilatoj kun familianoj kaj geamikoj.

Konsiderante la aranĝon de la ĉielaj korpoj en la tago, loko kaj horo de naskiĝo oni povas fari divers-specajn antaŭdiraĵojn pri la vivo kaj tasko, kiun ĉiu persono devas efektivigi dum sia vivo. Tio ĉi estas scienco kaj arto samtempe, kiun oni nomas *astrologio*. La antaŭdiraĵojn mem oni nomas *horoskopo*. Kompreneble, se ĉiu efektivigus sian vivo-taskon kunlabore kun sia planedo, la rezulto estus pli bona.

Jam ekde la ekesto de la mondo la planed-arajn influojn oni povis rimarki en la maro, tero, bestoj, vetero, floroj, en la tagoj kaj en la noktoj... En la malnova Egiptio, ekzemple, astrologiaj doktoroj faris cerban* operacion* bazitan sur la ŝanĝoj de la luno. Nuntempe ekzistas interesaj studoj sur la bazo, ke la lunŝanĝoj havas influon sur ĉio, kio havas vivon. Same, la suno donas al ni tagojn, forton por labori, faras fruktodona la teron, desegnas rideton sur ĉies vizaĝoj, helpas per sia lumo kaj varmo al la antaŭen-iro de la homaro.




**ŜAFO** (21 marto - 19 aprilo)

La unua signo de la zodiako, havas kiel regantan planedon Marson — dion de Milito. Ĝia natura elemento* estas fajro.

Homoj, kiuj naskiĝis sub tiu ĉi signo, estas aktivemaj, emaj fari, pretigi, batali. Ili estas tuj-reagemaj, rapidaj kaj maltimemaj. Kiam ili decidis ion, neniu povas kontraŭi tion. Ŝafo-homoj havas la kapablon ordoni. Ili ĉiam estas en la unua loko, ne eblas vidi ilin en la lasta. Ŝafoj estas kuraĝegaj, ŝatas danĝerajn situaciojn. Ilia tasko en la vivo estas krei bonajn kondiĉojn por si mem, por sia familio — por tiuj, kiu estas ĉirkaŭ ili.

*Famuloj, kiuj naskiĝis sub ĉi tiu signo:* Luis Miguel, Tennessee Williams, Linda Foodman, Georgina Almanza, Charles Chaplin, Jean-Paul Belmondo, Maria Felix, Gertrudis Gómez de Avellaneda, Vincent van Gogh, Celeste Mendoza, Nikita Hruŝĉov, Simone Signoret.



**FIŜOJ** (19 februaro - 20 marto)

La dekdua signo de la zodiako havas kiel regantojn Jupiteron — dion de la Bonŝanco, kaj Neptunon — dion de la Saĝo. *Natura elemento:* akvo.


Naskiĝintoj sub tiu ĉi signo estas legemaj, kor-malfermaj kaj donac-emaj. La estonto de tiuj ĉi personoj de-pendas de ilia propra elekto. La signo donas du eblojn: sukcesan vojon aŭ malhelan maron. Ili vojaĝas tra la vivo helpe de sia kor-luma intuicio. Ilia viv-ideo konsistas el tio, ke ili ne estas milionuloj sed vivas kiel milionuloj. Ilia tasko en la vivo estas helpi la aliajn — la planedoj donas ĉion necesan por tio.

*Famuloj:* Jan Baudouin de Courtenay, Leo Belmont, Emile Grosjean-Maupin, Albert Einstein, Michelangelo, Gabriel García Márquez, Enrico Caruso, Victor Hugo, Elizabeth Taylor, George Washington, Sarita Montiel, Frédéric Chopin, Georg Friedrich Händel, Auguste Renoir.

**AMFORO** (20 januaro - 18 februaro)

Dekunua signo de la zodiako, havas kiel regantojn planedojn Urano — dio de Aero, kaj Saturno — dia mesaĝisto de la Ne-atenditaĵoj. *Natura elemento:* aero.

Tre sentema al la fortoj de la naturo, tiu ĉi signo donas al tiuj, kiuj naskiĝis sub ĝi, super-naturajn kapablojn. Oni povas diri, ke Amforidoj estas mal-ordinaraj, sen-de-pendaj kaj ŝatas sekvi regulojn. Ili amas sendependecon kaj sekve ne povas havi estron. Ilia penso ne konas limon, ĝi estas universala. Ili vivas en la estonto*, ĉiam havas novajn ideojn. Ilia tasko en la vivo esta serĉi la veron, labori favore al la progreso de la homaro, libereco, inter-helpemo. Multaj eksterordinaruloj naskiĝis sub tiu ĉi signo.



*Famuloj:* Marie Hankel, Thomas Alva Edison, Plácido Domingo, Abraham Lincoln, Galileo Galilei, José Martí, Ronald Reagan, Charles Darwin, Franklin D. Roosevelt, W. A. Mozart, Rukmini, Gustavo Adolfo Becquer, Lola Flores, James Dean.

**KAPRIKORNO** (22 decembro - 19 januaro)

Deka signo de la zodiako, havas kiel reganton planedon Saturno — patro de la Dia Domo kaj mesaĝisto de la Ĉiamo. *Natura elemento:* tero.

Naskiĝintoj sub tiu ĉi signo estas gaje el-turniĝ-emaj, klar-pensaj kaj trankvilaj. Dum sia vojo tra la vivo ili marŝas malrapide, ĉar ili bone scias, ke necesas batali por atingi la venkon. Ili preferas malrapidigi kelkajn elektojn, ne gravas kial, poste ili decidas daŭrigi ĝis ili atingas sian celon. Post la tridekkvin-jariĝo la progreso estas iliaflanke kaj komencas vidiĝi la frukto de ilia laboro kaj persona vivo. Ilia firma personeco celas bonajn agojn. Ilia tasko en la vivo estas serĉi en la mistero de la naturo kaj favori la en-pens-iĝadon kaj antaŭvidadon.



*Famuloj:* Julio Baghy, Alejo Carpentier, Gabriela Mistral, Rubén Darío, Amaury Pérez Vidal, Martin Luther King, Louis Pasteur, Edgar Allan Poe, Isaac Newton, Helena Rubinstein, Elvis Presley.



**TAŬRO** (20 aprilo - 20 majo)

Dua signo de la zodiako, havas kiel regantan planedon Venuson — diinon de Beleco kaj Amo. *Natura elemento:* tero.

Naskiĝintoj sub tiu ĉi signo estas harmoniemaj*, kreemaj kaj eblas kredi je ili. Ili bezonas sen-danĝerecon kaj havi bonan domon ekde la juneco. Ili ĝuas bonan manĝadon kaj trinkadon, kaj amas la naturon kaj kamparon. Laboremuloj. Ilia tasko en la vivo estas la harmonio — nenio povas kontraŭi la harmonion, kiu devas ekzisti inter ili kaj iliaj ĉirkaŭantoj. Oni ne kolerigu Taŭr-idojn, ĉar kvankam agrablaj, ridemaj kaj tre bonkoraj, ili portas taŭron ene. La rezulto de ilia vivo estas pozitiva, la bonaj steloj estas ĉe ili.

*Famuloj:* Benito Pérez Galdós, Honoré de Balzac, Orson Welles, Katarina La Granda, Robespierre, Barbara Streisand, Salvador Dalí, William Shakespeare, Henry Fonda, Shirley Temple.

**SAGITARIO** (22 novembro - 21 decembro)

Naŭa signo de la zodiako, havas kiel regantojn planedojn Jupitero — dio de Bon-ŝanco, kaj Neptuno — dio de Saĝo. *Natura elemento:* fajro.

Ili havas bonajn kvalitojn, inter kiuj estas bon-ŝanco kaj inteligento. Oni povas diri, ke Sagitari-idoj iĝas, dum sia vivo, gravaj personoj en la okupo, kiun ili elektis. Dum la tuta vivo ili montras junecon kaj al-iras la vivon kun gajo, ĉar Ili bone scias, ke la barojn ili sukcesos venki. Tiu ĉi signo elstaras pro sia granda amo al legado, literaturo, vojaĝado, kaj naskiĝintoj sub ĝi estas idealistaj, noblaj kaj kuraĝaj. Ilia tasko en la vivo estas batali kaj impulsi per ideoj, kiujn ili donas al aliaj.



*Famuloj:* Lazaro Ludoviko Zamenhof, Ludwig van Beethoven, José Lezama Lima, Carlos Gardel, Walt Disney, Papo Johano la 23-a, Frank Sinatra, Dulce Maria Leynaz, Edith Piaf, Frank Sinatra, Arthur Brisbane, Joe Di Maggio, Mark Twain.



KONTAKTO n-ro 152 (1996:2)

## ĜEMELOJ (21 majo - 20 junio)




Tria signo de la zodiako, havas kiel regantan planedon Merkuron – dion de Saĝo. *Natura elemento:* aero.

Naskiĝintoj sub tiu ĉi signo estas komunikemaj, gajaj kaj inteligentaj. Impulsiĝemaj* pro la elkora volo ekhavi aferojn kaj la amo al superaj studoj. Al ili ne gravas, kiom kostas atingi ion — ili havas bonajn kondiĉojn por venko, ĉar Merkuro donas al ili grandan inteligenton. Ili povas lasi belan bildon de si al alia. Viglaj en sia parolado kaj agado, ilia rimarkinda eco estas la kapablo fari du aferojn samtempe, la bezono vojaĝi, ade ŝanĝi la ĉirkaŭaĵon kaj koni novajn homojn. Ilia vivo-tasko estas favori per sia feliĉo alies feliĉon.

*Famuloj:* Giorgio Canuto, Antoni Grabowski, Juan Luis Guerra, Federico García Lorca, Laurence Olivier, Ernesto Che Guevara, John F. Kennedy, Rudolph Valentino, Michael Todd.

## KANKRO (21 junio - 22 junio)



"Patrino" de la zodiako, havas kiel reganton la lunon — diinon de la Nokto kaj mesaĝ*-isto de la Mistero*. *Natura elemento:* akvo.

Naskiĝintoj sub tiu ĉi signo ŝatas diri ĉiam la veron, estas kor-molaj kaj neordinaraj. Ili havas grandan kapablon ami, esti bonaj gepatroj kaj gefiloj. Sentemeco kaj imagi-povo favoras ilian emon al arto, literaturo, muziko, poezio. Per sia granda intuicio* ili povas rigardi en la misterajn sciencojn kaj povas studi historion, labori ĉe el-fosado de restaĵoj, ktp. Ili bezonegas amikecon, amon de familianoj kaj amikoj. Ili amas la aliajn, helpas kaj sentas kun ili. Ilia tasko en la vivo estas helpi al la progreso de la homaro.

*Famuloj:* Alfred Michaux, Maritza Gutiérrez Glez, Pablo Neruda, Garilda Oliver Labra, Nicolás Guillén, Rembrandt, Ernest Hemingway, Ingmar Bergman, Gina Lollobrigida, Rubens, Rafaella Carra kaj... *mi!*

# la steloj parolas

*facila*


Antaŭ jarmiloj la sciencistoj grupigis arojn da steloj, la *konstelaciojn*, laŭ sia imago kaj donis al ili nomon respondan al la bildoj, kiujn ili formas. Ĉirkaŭ la rondira vojo de la suno estas 12 konstelacioj, kiuj formas kvazaŭ zonon*; tiu zono enhavas ankaŭ ĉiujn lokiĝojn de la planedoj. En astrologio oni nomas tiun zonon *zodiako*.

La zodiakaj konstelacioj aŭ *domoj* estas: *Ŝafo, Taŭro, Ĝemeloj, Kankro, Leono, Virgo, Pesilo, Skorpio, Sagitario, Kaprikorno, Amforo* kaj *Fiŝoj*. La suno pasas tra la konstelacioj dum unu jaro. Tiel, ekzemple, se je nia naskiĝo la suno troviĝas en la domo de Kankro, nia *signo* estas Kankro; se la suno tuŝas la domon de Kaprikorno, ni estas sub ties influo kaj sekve Kaprikorno iĝas nia signo. Sciante tion ĉi, oni povas facile lerni pri la zodiakaj signoj kaj ankaŭ pri la reganta planedo.

Se vi jam legis ĝis tie ĉi, eble vi deziras demandi, ĉu astrologio helpas niajn interpersonajn kontaktojn? Jes: ĝi donas klaran, rapidan kaj ĝustan respondon. Sekvante sian horoskopon oni plibonigas siajn personajn rilatojn en la hejmo, laborejo, kun siaj geamikoj. Fakte oni devas rigardi astrologion kiel feliĉigilon. Kiel praktika scienco, ĝi helpas nin antaŭ la baroj, kiuj ni renkontadas en nia vojaĝo sur la tero.

**cerbo:** "pens-ilo"
**elemento:** konsist-ero
**estonto:** la tempo, kiu venos
**favore:** helpeme, bonvole subtene
**harmonio:** plaĉa rilato inter la sentoj de pluraj personoj
**impulso:** ek-puŝa forto
**influo:** efiko sur iu aŭ io
**intuicio:** senta antaŭscio pri io
**mesaĝo:** sendata informo
**mistero:** io kaŝita aŭ neklarigebla
**operacio:** kuraca interveno en la interno de la korpo
**optimisto:** homo, kiu ĉiam vidas la bonan flankon de io
**planedo:** mondo rondiranta sunon
**zono:** ĉirkaŭ-ilo, ekz. por ĝustigi pantalonon al nia korpo

## LEONO (23 julio - 22 aŭgusto)



Kvina signo de la zodiako, havas kiel reganton la sunon — dion de la Tago kaj mesaĝiston de la Vivo. *Natura elemento:* fajro.

Naskiĝintoj sub tiu ĉi signo estas fajreceme, impulsiĝemaj kaj inteligentaj. Facile oni povas vidi la idojn de Leono tiel en kunsidoj kiel en festoj. Naturaj kreemuloj, ili sen-lace batalas ĝis la fino de siaj fortoj. Oni povas vidi ilin atingi la pinton dum la vivo, kiel estroj. Ili estas sci-volemaj, volas fari novajn agojn, daŭre bezonas senti la rezulton de novaj laboroj, atingitan de ili mem. Ilia tasko en la vivo estas lerni kaj lernigi la aliajn.

*Famuloj:* Edmond Privat, Dustin Hoffmann, Bill Clinton, Fidel Castro, Alfred Hitchcock, Madonna, Robert de Niro, Julián Hernández Ángulo, George Bernard Shaw, Napoleono, Jacqueline Kennedy, Robert Taylor, Eddie Fisher.

## VIRGO (23 aŭgusto - 22 septembro)

Sesa signo de la zodiako, havas kiel reganton Merkuron — dio de la Saĝo. *Natura elemento:* tero

Naskiĝintoj sub tiu ĉi signo estas veremaj, tradiciemaj kaj sentemaj. Virg-idoj estas personoj, kiuj uzas sian cerbon kaj lernas tre facile ĉion. Ilia planedo donas al ili inteligenton kaj ilia natura elemento favoras la praktikajn, konkretajn rezultojn. Estante metodemaj, ili scias bone organizi sian vivon. Ili juĝas aliajn sed ankaŭ sin mem. Estas normale al ili scii, kion ili devas fari. Ili havas grandan internan vivon kaj bezonas senti sin utilaj. Ilia tasko en la vivo estas konservi la kredindecon en siaj bonaj agoj kun la aliaj. Ili venkos tiel ekonomie kiel socie.




*Famuloj:* Emil Boirac, Andreo Cseh, Greta Garbo, Michael Jackson, Sophia Loren, Benny More, Ingrid Bergman, Ignacio Villa, Maurice Chevalier, Lyndon Johnson, Reĝino Izabela la 1-a, Kardinalo Richelieu, Goethe, Lafayette.

## SKORPIO (23 oktobro - 21 novembro)

Oka signo de la zodiako, havas kiel regantojn Marson — dion de Milito, kaj Pluton — dion de la Grandaj Ŝanĝoj. *Natura elemento:* akvo.

Naskiĝintoj sub tiu ĉi signo estas sen-lacaj, energiaj kaj forte al-tiraj. Dum la tuta vivo ili ĉiam estas batalantoj por atingi la venkon sen timi fortajn laborojn. Ili estas mal-optimistaj en la parolado sed optimistaj en la agado. Ili havas emon al estr-eco ĉar iliaj planedoj donas forton necesan por tio. Inteligentaj kaj ankaŭ intuiciaj, ili facile malkonsentas en la agado. Ili sentas intereson pri la mistera naturo kaj pri nekonataj aferoj. Ilia tasko en la vivo estas kunlabori kun aliaj por malkaŝi la valoraĵojn ekzistantajn sub la tero.




*Famuloj:* Felikso Zamenhof, Manuel O. Rodríguez Rabago, Juan L. Besada, Marta Alonso, Burt Lancaster, Alain Delon, Antonio Gades, Charles Bronson, Indira Gandhi, Pablo Picasso, Giordano Dimarzo.

## PESILO (23 septembro - 22 oktobro)

Sepa signo de la zodiako, havas kiel reganton Venuson — diinon de Beleco kaj Amo. *Natura elemento:* aero.

Naskiĝintoj sub tiu ĉi signo estas justaj, optimistaj* kaj afablaj. Oni povas diri, ke Pesilo-homoj estas agrablaj, ĝentilaj kaj pacemaj en ĉio, kion ili devas fari dum la vivo. Kie ajn ili troviĝas, ili ĉiam bezonas batali por justeco. Por ili estas principe grave teni bonajn rilatojn kaj harmonion tiel en sia domo kiel en sia laborejo. La idoj de Pesilo havas specialan personecon, kiun oni prefere atentu. Ilia tasko en la vivo estas harmonii, beligi kaj montri la direkton por trovi feliĉon en la vojo sur la tero.



*Famuloj:* Kálmán Kalocsay, Louis de Beaufront, Hector Hodler, Oscar Wilde, Mahatma Gandhi, Marcello Mastroianni, Montgomery Clift, Michael Todd, Franz Liszt, Pierre Trudeau, Sara Bernhardt, Brigitte Bardot, Dwight Eisenhower.

# La reveno de Ramseso la 2-a

**Egipt-emuloj feliĉiĝu: la "granda" patro, lia dekduo da edzinoj (inter ili la ĉiela Nefertari) kaj ĉirkaŭ 100 infanoj estas novaĵo denove!**

*facila*

La historio pri tiu ĉi reĝa* dom-anaro estas de-nove sur-voje dank' al Kent Weeks, kiu instruas en la Usona Universitato de Kairo. Li sur-tabl-igis siajn lastajn el-trovojn la 18-an de januaro en konferenco*, kiun organizis la oficejo de Unesko en Egiptio kaj la nacia turisma* oficejo.

En sia 54-a vivojaro, tiu ĉi usona arkeologo* havas kiel fortan celon pri-studi la tombon* de la infanoj de la plej mem-ama kaj ne malpli patriĝ-ema el la faraonoj*: La tombo, kiun oni malkovris* en 1820, kuŝis en forgeso ĝis Weeks komencis siajn el-terigajn laborojn en decembro 1994, dum kiuj li malkovris "mirindan strukturon*" malantaŭ kaŝaj pordoj, kie tra-ir-ejoj malfermiĝas sur dekduoj da ĉambroj subteraj en la Valo* de la Reĝoj. "La sola familia tombego de la tempo de la faraonoj" legiĝas sur murbildo de Ramseso la 2-a kaj 25 el liaj filoj.



Ramseso la 2-a servas al ĉio-pova supernaturulo Min.

"Mi esperas, ke ni povos ekscii pli pri la funkcio de la infanoj en la kortego* kaj pri ilia rilato kun sia patro" diras Weeks. Ĝenerale oni konsentas, ke estis 52 knaboj kaj 48 knabinoj. Sed tiuj ĉi numeroj estas for de nia plena certeco. Krom pri Merenptah, la posteulo de Ramseso kaj lia 13-a filo, la vivon de la aliaj ĉirkaŭas mistero*. "En diversaj temploj* ni trovas la nomojn de la filoj en ĝuste la sama sin-sekvo. Sed la skribaĵoj kelkfoje donas alian oficnomon; ŝajnas, ke iu filo frue en sia vivo havis certan lokon en iu okupo sed poste alt-iĝis al alia. Sub la estr-ado de Ramseso la 2-a, liaj filoj klare ludis multe pli gravan funkcion en la kortego. Ili ricevis aparte el-staran lokon kaj alprenis multan respondecon, aparte en la militaj aferoj. Mi pensas, ke tiu estas unu el la kialoj, kial oni en-tomb-igis ilin en tiel speciala maniero."

La mistero pli-larĝiĝas ĉe la filinoj de Ramseso. "Ni havas la nomojn de ĉirkaŭ 40 filinoj kaj scias, kie kuŝas kvar el ili. Du el tiuj ĉi filinoj edzin-iĝis al la faraono, ver-ŝajne en simbola* maniero."

Por malkovri pli ni devos atendi ĝis junio, kiam Weeks revenos al la tombo. "Ni for-movis restaĵojn de nur kvar ĉambroj. Ni devas malplenigi ne malpli ol aliajn 92."

"Ramseso filo, Seti kaj la aliaj revenis por rakonti al ni pri sia vivo. Pli ol 3000 jarojn post ilia morto la publiko denove ripetas iliajn nomojn, kio revivigas ilin. Mi certas, ke ili estus feliĉaj pro tio"

***Sophie Boukhari***

(El *UNESCO Sources* n-ro 76, feb. 1996)




**arkeologo:** sciencisto pri aĵoj de malnovaj tempoj
**faraono:** ofic-nomo de la malnov-egiptaj *reĝoj*
**konferenco:** ariĝo de fakuloj, kiuj renkontiĝas por interkonsiliĝi
**kortego:** loĝejo de reĝ(id)o kaj la tuta gravularo, kiuj tie lin ĉirkaŭas
**kovri:** meti ion sur ion por kaŝi aŭ zorgi ĝin
**mistero:** fakto, afero kaŝa aŭ neklarigebla
**reĝa:** rilata al *reĝo* (= dum-viva ŝtat-estro)
**simbola:** ne fakta sed nur iel signifa
**strukturo:** maniero, en kiu oni kunaranĝas la diversajn partojn de io, ekz-e konstruo
**templo:** konstruaĵo por la servo de superhomaj estaĵoj
**tombo:** truo en la tero por sen-vivulo
**turisma:** plezur- aŭ sportvojaĝa
**valo:** malalta ter-parto, kiun ĉirkaŭas montoj



# Verdaj fol

**Per libro pri arboj aperonta en 20 lingvoj, sukcesa kunpublikigada programo en Azio komencas serion por enkonduki infanojn en la zorgadon pri la medio.**

Por Kyoto Matsuoka, bibliotekisto ĉe la Infana Biblioteko de Tokio, la gajnon eblas vidi sur la vizaĝoj de la junaj legantoj. "Mi vidas ilin pasigi multan tempon rigardante la librojn," li diras. "Ili trovas la bildojn pri aliaj kulturoj tre interesaj kaj ilia sci-volemo progresas en tre natura maniero."



La libroj pri kiuj Matsuoka parolas, estas la rezulto de tre sukcesa eduka plano de Unesko en la Azia-Pacifika regiono. Temas pri la Azia/Pacifika Programo de Kunpublikigado (APK).

APK produktis 25 titolojn*, kiuj estis tradukitaj kaj publikigitaj en 27 aziaj lingvoj en 18 diversaj landoj. La libroj ankaŭ estis presitaj en naŭ eŭropaj lingvoj, kun nuntempe preskaŭ 4 milionoj da ekzempleroj* tutmonde legataj. La APK estas kun-ordigita de la Azia/Pacifika Kultura Centro por Unesko (AKCU) — kies sidejo estas en Japanio, kaj celas plivastigi la interkompreniĝon en Azio.

### Grava ŝanĝo

Unue specialistoj de la Membroj Ŝtatoj de Unesko estas invititaj al jara kunveno por diskuti la projektojn de kunpublikigado. Sur-baze de la rezultoj de tiuj kunvenoj, AKCU efektivigas anglalingvan *"originalon"* de iu certa libro uzante tekstojn kaj ilustraĵojn* de regionaj kunlaborantoj. Sekve la unu-opaj landoj produktas lokajn eldonojn en diversaj lingvoj. La kostoj grave malkreskas pro la jama ekzisto de la libro-aranĝo kaj produktado por la originalo.



Ĝis nun APK aperigis ĉefe arojn da popolaj rakontoj, sed la lastaj titoloj signis turnopunkton en la programo. Je la unua fojo tri-kajera serio adresiĝas al gravega temo, la medio, klarigas Shinji Tajima, unu el la estroj de AKCU.

La originalo de *Arboj*, la unua kajero en la serio, estis publikigita en marto 1995 kaj devos esti havebla en almenaŭ 20 lingvoj je la fino de 1996. Ilustrita per fotoj kaj desegnoj, la libro priskribas diversajn arbojn de la azia-pacifika regiono, klarigas pri la funkcio de la arbaroj kaj igas la legantojn sentemaj pri la arbarprizorgado. La dua kajero, *Akvo*, devas esti legata komence de 1997, kaj la fina ero, *La suno*, devos aperi en 1999.

# ...ioj por Azio

*facila*




**Rigardo al la estonto**

Kun suma antaŭkalkulo de $175 000 por la jara produktado de unu originalo en la angla, kiu ebligas labor-pagon por la verkistoj kaj artistoj, el-presadon kaj bindadon*, renkontiĝojn de redaktistoj el dudeko da landoj, distribuajn* kostojn kaj helpadon por publikigo en lokaj versioj*, la projekto ne vere donas en-spezojn — sed tio ankaŭ ne estas la celo. En tuta Azio nur la japanaj eldonoj donas monan gajnon.

Kun la alproksimiĝo de la 21-a jarcento APK planas vastigi siajn horizontojn* al modernaj mirindaĵoj kiel komputila lego-disko, Inter-reto kaj interaktiva komunik-servoj.

**Esperantisto antaŭ-agis**

**Estas interese rimarki, ke jam en 1990 esperantisto Martin Burkert, la "patro" de Pepo – la papago de *TEJO-tutmonde*, laborante en Azio rimarkis mankon de eduko pri la medio en la infanoj de tiu regiono (vd. *Kontakto* n-ro 143, 1994:5). La rezulto estis la apero de la libro *La arbo... kiu forkuris* en Esperanto kun apuda traduko en la japana (19,20 gld. ĉe UEA), kiun Martin mem verkis kaj ilustris kaj Libroteko Tokio publikigis. En 1994 sekvis Esperanta-ĉina eldono fare de eldonejo Big Tree Culture el Tajvano. Bedaŭrinde la ek-paŝon de Martin ne sekvas aliaj esperantistoj, sed ĉiuokaze estas interese rimarki, ke fojon plian esperantisto antaŭis tion, kion la mondo nur iom poste malkovris. *[Red.]***




***La libro** de Martin Burkert, laste eldonita ankaŭ en la ĉina lingvo. Pli supre, ilustraĵo de la Unesko-serio.*

Tajima ne dubas, ke la estonto de la kunpublikiga programo estas certigita. Unue neniu vere interesiĝis pri la kultura havaĵo de Azio, sed la aziaj ekonomioj ek-kreskis kaj sekve estas plia bezono por tiuj kulturaj rimedoj. "Estas multaj infanoj en la regiono," li diras. "Ili ĉiuj bezonos librojn."

***David Lazarus, Japanio***

(El *UNESCO Sources* n-ro 76, feb. 1996)

---

**distribui:** disdoni
**bindi:** kun-kudri la kajerojn de libro kaj surmeti sur ilin malmolan kovrilon
**ekzemplero:** ĉiu el la kopioj de libro aŭ revuo
**horizonto:** ter-linio, kie finiĝas nia vid-atingo
**ilustraĵo:** desegnaĵo por teksto
**titolo:** nomo de verko
**versio:** prezento de io, farita el aparta vid-punkto

**LA NOVA REALISMO**
**de Bruno Vogelmann**
185 p. 19,80 gld. Pri Nova Pensado, Religieco Novstila, homaron unuiganta mondkoncepto. Premio Deguĉi, Premio FAME. Tradukita en 26 naciajn lingvojn. Havebla de ĉiuj libroservoj. El nepagipovaj landoj skribu al la aŭtoro, pk 1564, DE-74555 Crailsheim, Germanio.

# Nunaj kuracistoj

*facila*

——— ***Liu Xiaozhe, Ĉinio***

Supozu, ke vi fartas iom malbone, do vi vizitas hospitalon*. Vi sidiĝas antaŭ kuraciston, kiu demandas, kio okazas al vi. Vi respondas, ke doloras via kapo. La kuracisto demandas, kiun kuracilon vi deziras. Vi diras al li, kion vi volas. La kuracisto receptas* laŭ via postulo. Vi revenas hejmen kun la kuracilo, kiun vi prenas laŭ la konsiloj sur la kuracil-boteleto. Post kelkaj semajnoj vi resaniĝas aŭ... pli grave malsaniĝas.

Paciento* mem diagnozas* sin kaj receptas por si. Ĉu sensence? Jes, sed tio estas la vero, kiun oni ofte renkontas en ĉinaj hospitaloj.




"Observi*, aŭdi kaj flari*, demandi, kontroli la pulson*", tio estas la tradicia diagnozmetodo de ĉina medicino*, per kiu ĉina tradicia kuracisto rapide diagnozas malsanon al paciento. Spertaj kuracistoj eĉ povas ĝuste diagnozi la sansituacion kaj malsanon ĉe la malsanuloj per nura observado de la vizaĝa koloro kaj kontrolado de la pulso antaŭ ol la paciento ek-rakontas pri sia farto. Bedaŭrinde tiaj spertaj kuracistoj malmultiĝas jaron post jaro.

La ĉina politiko de reformado kaj malfermo, kiu komenciĝis en 1978, rapidigas la ekonomian dis-volviĝon, samtempe grande ŝanĝante la ideojn kaj vid-punktojn de ĉinoj. Nun la tuta socio ŝajne disvolviĝas per la mov-forto, kiun naskas la amo al mono. En Ĉinio kuracistoj ne apartenas al la riĉula parto de la socio. Vidinte, ke aliaj homoj rapide riĉiĝas per diversaj manieroj — laŭleĝaj aŭ ne — multaj kuracistoj, precipe la junaj, ne povas plu trankvile praktiki sian profesian laboron. Rezulte ili ne volas studi por altigi sian kuracan nivelon kaj ofte traktas senzorge la pacientojn. Kelkaj eĉ akceptas korupt*-monon de malsanuloj, kiuj volas ricevi pli bonan kuracan servon.

Krome, nuntempe en Ĉinio reklamado de kuracilo en televido kaj gazetaro estas tute permesita. Ĉiutage oni estas ĉirkaŭata de multaj reklamoj, kiuj kredigas al la publiko, ke ĝi povas elekti mem la ĝustan kuracilon kontraŭ sia malsano. Ŝajne ili ne scias, ke sama malsano kaŝas diversajn kaŭzojn, kontraŭ kiuj oni devas preni diversajn kuracilojn.

---

**diagnozo:** el-trovo de malsano per esploro de la signoj kaj rakontoj de la paciento
**flari:** senti per la nazo
**hospitalo:** sen-kosta kuracejo
**korupto:** ago per kiu oni maljuste aĉetas ies servon
**medicino:** scienco kaj arto kuraci
**observi:** rigardi kun daŭra atento, por esplori
**paciento:** kuracato
**pulso:** sango-batado
**recepti:** skribi klarigon pri preparado kaj uzado de kuracilo

# La lingvo de la okuloj

facila

— Ulrich Matthias, Germanio

Observi* homojn estas mia ŝat-okupo. Pro tio mi ŝatas veturi en trajnoj, precipe en fermitaj 6-personaj kupeoj*, kunvojaĝante kun fremdaj homoj en tia proksimeco, kian oni aliloke malhavus. Ĝuste en tian kupeon mi iris ĉi-vespere. Vidante nur tri homojn en ĝi, mi malfermis ĝian pordon kaj ekdemandis: "Bonan vesperon. Ĉu ĉi tie ankoraŭ estas libera loko?" La tri pasaĝeroj — du gemaljunuloj kaj unu knabino — kapjesis, kaj la maljuna virino montris al mi per mansigno, ke mi mem elektu iun tro okulfrapa eksteraĵo. Sed ŝia vizaĝo elradias mild*-econ, kiun plifortigas la hela bruno de ŝia hararo same kiel la suna koloro de ŝia ĉemizo. Nek artefaritajn vizaĝkolorojn nek plibeligajn aldonaĵojn mi rimarkas. Natura belo.

Dum mi pensas pri ŝi, la maljunulino montras sandviĉon* al la viro. Senvorte. Li akceptas ĝin. Ankaŭ senvorte. Tutcerte ili estas geedzoj, malnovaj geedzoj. Iam mi legis, ke ordinaraj malnovaj geedzoj interparolas nur sep minutojn tage. Ĝuste tiaj estas tiuj ĉi. Sendube.

"Tio min ĉagrenas*, ke vi ne enpakis la gazeton."

Tedaj homoj. La mondo estas plena je mirindaĵoj kaj neatenditaĵoj, sed tiuj du uloj havas nenion pli agrablan por diri. Fakte, mirindaĵoj interesas min pli. Kaj konsciiĝante* pri tio, mi denove rigardas al la knabino. Al mia anĝelo. Ŝi certe nur malfrue ekinteresiĝis pri knaboj. Mi eĉ povus imagi, ke ŝi ankoraŭ neniam havis amanton. Eble la amo de panjo* kaj paĉjo* ankoraŭ sufiĉas por ŝi.



ajn el la tri liberaj lokoj. Mi metis mian dorsosakon sur la pakaĵ-tenilon kaj eksidis. Dume la trajno jam ekveturis. "Teda* vojaĝo", mi pensas post kelkaj minutoj, "ili ĉiuj silentas, apenaŭ moviĝas, apenaŭ spiras..."

Mia observemo tamen ne ripozas. Sen tro rimarkeble turni mian kapon al ili, mi rigardas la du maljunulojn. "Verŝajne ili estas geedzoj", mi pensas. Sed, racie* pensante, mi rimarkas, ke nenio en ilia ag-maniero montras tion. Ili ne interparolas, ili eĉ ne vere rigardas unu la alian. Kvazaŭ du fremduloj.

Mia rigardo transiras al la knabino. Ĉirkaŭ 20-jara mi juĝas ŝin, kaj supozas, ke ankaŭ ŝi studas, kaj ĵus pasigis la semajnfinon hejme ĉe siaj gepatroj. Ŝi aspektas kiel dormanta infaneto. Kiel anĝelo*. Silentaj homoj kun kontenta vizaĝo estas dolĉaj. Iom malgranda ŝi estas, kun unuavide ne

La knabino interesas min pli. Ĉu malantaŭ ŝia trankvila aspekto troviĝas seninteresiĝo aŭ kaŝita korbrulo? Certe ŝi estis tre obeema infano. La gepatroj ŝin bone edukis. Ĉu ŝi simple neniam estis kontraŭema, aŭ ĉu ili mortigis ŝian volon per psika*, eble eĉ fizika* perforto, tiel ke interne suferigas ŝin subpremitaj sentoj kaj kor-tuŝoj? Ne, ŝi aspektas sufiĉe feliĉe...

"Ĉu vi enpakis la gazeton?" La voĉo de la viro rompas la silenton. Ŝajnas, ke la ekzercado pri la sandviĉo vekis lin el lia senviveco. Finmanĝinte, li nun volas ion legi.

"Ne, kial?", respondas la edzino.

"Mi diris al vi, ke vi enpaku la gazeton."

"Tion mi ne aŭdis."

"Mi nun volas legi la gazeton."

"Mi pensis, ke vi faris tion jam hejme. Krome, ni ja baldaŭ alvenos."

"Tio min vere ĉagrenas, ke vi ne enpakis la gazeton", subite ripetas la viro. Kaj la rigardoj de mia anĝelo kaj mi renkontiĝas. Ŝiaj okuloj montras unue al mi, poste kaŝe al niaj du kunvojaĝantoj, kaj fine denove al mi. Ni ridetas unu al la alia. Ni pensas same. Mi ŝategas ŝin, ĉar mi ŝategas homojn, kiuj regas la lingvon de la okuloj. Malmultaj, tro malmultaj ĝin parolas.

Tiel ankaŭ la du maljunuloj nenion rimarkis. Ankoraŭ dek minutojn ni vojaĝis kvarope. Tiam okazis io, kion mi ege deziris kaj samtempe ege timis: La du maljunuloj eliris ĉe la sekva stacio, kaj neniu nova venis en nian kupeon. La trajno denove ekmoviĝis. Streĉita malcerteco pendas en la aero. Neniam antaŭe mi tiom forte sentis la malvastecon de trajnkupeo. Mi apenaŭ kuraĝas ĵeti rigardon al ŝi. Ĉar observante homojn, oni ĉiam atentu,

ke la alia ne sentu sin tro observata. Aliflanke, ĉu virinoj povas diferencigi rigardojn, kiuj admiras anĝelojn, de tiuj, kiuj nur deziras konkeri* objektojn? Ŝi verŝajne jes. Do mi ne tro timu. Kaj dum nia veturo tra la malhelo nia kupeo ja donacas nenion alian vidindan.

Ŝajne ankaŭ ŝi tion komprenis. Subite niaj rigardoj denove renkontiĝas, kaj ĉi-foje ŝia rideto eniras profunde ĝis mia koro. Io varma kaj milda trafluas kaj plenigas min, ĝi faligas min en ĉielan senton. Ho, kiom mi amas tiun ĉi senton, ho, kiom mi dankas al mia patrino, ke iam, kiam mi estis ankoraŭ bebo*, ŝi jen kaj jen ridetis al sia infano el plena koro, tiel forprenante de ĝi ĉiujn timojn kaj zorgojn kaj lulante* ĝin reen al praa feliĉo, kvazaŭ reen en sian enon. Unue subkonscie, poste racie, mi sciis, ke tiaj momentoj ĉiam revenos en mia vivo, eĉ se nur malofte, kaj tial mi neniam serioze pensis pri memmortigo. La vivo tro belas, ĝi donas tro da ŝancoj por profunda feliĉo. Precipe, se mi ne perdos ŝin, mian anĝelon. Kaj tiucele mi devas ekparoli kun ŝi, eĉ se tio rompas nian silentan, sonan trankvilon.

"Ĉu ankaŭ vi studas en Heidelberg?", mi demandas ŝin.

"Jes, ĉe la por-instruista altlernejo", ŝi respondas. Unuafoje mi aŭdas ŝian voĉon, kun plezuro notante, ke ĝi sonas ĝuste tiel varme kaj milde kiel mi imagis ĝin.

"Kaj do vi verŝajne loĝas en unu el la apudaj studentaj hejmoj, ĉu ne?", mi daŭrigas jam sentante min ĝoja kaj memkontenta pro tio, ke mi sukcesis komenci interparolon kun ŝi.

"Ne, mi loĝas en Eppelheim, ne tiom proksime al la altlernejo."

"Ĉu vi nun veturos per tramo* tien?", mi sen-pripense plu demandas, jam imagante, ke mi akompanos* ŝin dum la veturo, kvankam Eppelheim ne vere estas mia direkto kaj krome antaŭ la stacidomo atendas min mia biciklo.

"Hm", ŝi respondas, kaj ŝajnas al mi, ke tio signifas "Jes, kompreneble".

Ni silentas. "Ŝi vere estas trankvila homo", mi pensas, kiam mi konsciiĝas pri tio, ke ŝi nur respondis al miaj demandoj sed ne reciprokis* ilin. "Sed ĝuste tiaj silentemaj homoj povas havi tre profundan internaĵon." Dum mi pripensas, ĉu mi nun demandu ŝin pri detaloj de ŝia studado aŭ ĉu mi simple rakontu ion pri mi mem, ŝi subite leviĝas kaj surmetas sian dorsosakon. "Mi devas foriri nun... Ĝis!" Ŝiaj vortoj frapegas min. Elirante el la kupeo, ŝi donacas al mi lastan rideton, dum ŝiaj okuloj diras: "Mi kompatas vin."

"Mi ne komprenas", respondas la miaj. Ja restas ankoraŭ almenaŭ dek minutoj ĝis Heidelberg. Ŝi tute ne aspektis, kvazaŭ ŝi apartenus al tiuj homoj, kiuj maltrankviliĝas jam kvaronan horon antaŭ la halto de la trajno pro la timo maltrafi sian stacion. Kaj verŝajne ŝi eĉ ne devas rapidi al la trajnhaltejo, ja la tramoj ankaŭ vespere veturas ankoraŭ ĉiun dudekan minuton.


Jam ŝi estas for. Ĉu mi tuj sekvu ŝin? Tio aspektus ne-nature. Ankoraŭ postrestas la feliĉo en mi, sed la racio min atentigas. Se mi ne reagas nun, mi morgaŭ iros tra la por-instruista altlernejo kaj la tuta urbeto Eppelheim, ĉie elrigardante pri knabino, kies nomon mi eĉ ne konas. Aŭ mi provos retrovi ŝin pere de anoncgazeto aŭ la loka radio, kiel lastatempe faras multaj gejunuloj en similaj situacioj. Estas pli bone reagi nun. Tiu bolado, kiun mi sentas en mi, fakte estas tiom forta, ke sendube temas pri amo. Ŝi tiom mankas al mi, ke necesas sekvi ŝin. Mi imagas, kiel mi demandas ŝin pri ŝia adreso ĉe la trajnpordo, sur la kajo*, ĉe la tramhaltejo aŭ en la tramo; mi vidas nin iri man-en-mane al ŝia domo...

Elirante el la kupeo, mi finfine vidas ŝin ĉe la trajnpordo, sed intertempe jam pluraj homoj staras inter ni. Estus malfacile preterpasi ilin. Fine la trajno haltas. Elirinte, mi serĉas ŝin sur la kajo. Subite kvazaŭ fulmo io min trapikas kaj disŝiras: Jen iu lip-harulo ŝin ĉirkaŭbrakas kaj fajre kisas. ❑


# LIBRO DE AMO

***"Leganto, se vi estas pruda***
***Kaj naŭzas vin la amo nuda ..."***

... tiam nepre *ne* aĉetu ĉi tiun faman majstroverkon de la Esperanta erotika poezio, kiu malkovris al tiom da geesperantistoj la misteron kaj belon de sekso.



Peter Peneter kaj Georgo Peterido Peneter. Byblos: Je la ŝildanonco de "L'Akacio", 1969. 262p. 20cm. Enhavas la senpudoran *Sekretaj sonetoj* (1931) k.a. Prezo: 21,00 gld. Triona rabato ekde 3 ekzempleroj. Mendu ĉe UEA.


**KRUCVORTA KONKURSO – REZULTO**

La konkurson de *Kontakto* 150 (1995:6) partoprenis entute 4 homoj el Bjelorusio, Britio, Hungario kaj Irano. Lotume venkis **Petro Denke** el Hungario. Gratulon al li!

| | 1 | 2 | 3 | 4 | 5 | 6 | 7 | 8 | 9 |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 1 | C | I | F | E | R | P | L | A | T |
| 2 | I | N | O | K | U | L | A | D | O |
| 3 | R | E | T | E | N | I | ■ | E | N |
| 4 | K | R | I | S | O | L | ■ | ■ | D |
| 5 | O | T | ■ | T | ■ | O | P | E | R |
| 6 | N | A | C | I | A | N | I | G | I |
| 7 | S | ■ | A | S | I | G | N | O | ■ |
| 8 | T | E | R | ■ | L | I | I | ■ | P |
| 9 | A | G | A | R | A | G | A | R | O |
| 10 | N | E | ■ | A | N | I | M | A | L |
| 11 | C | ■ | R | E | T | S | A | K | O |
| 12 | O | R | E | L | O | ■ | N | O | O |


*Ame kaj klere verkita klasikaĵo:*

# Vivo de Zamenhof

(1920)

de Edmond Privat

134 p. 18 cm.
Bind. 18,90 gld.
Triona rabato ekde tri ekz.


**akompani:** esti aŭ iri kun iu
**anĝelo:** ĉiela estaĵo, meza inter Dio kaj homo
**bebo:** infaneto
**fizike:** korpe
**ĉagreni:** kaŭzi malplezuron al iu
**kajo:** altaĵo konstruita laŭlonge de fervojo por ebligi al la vojaĝantoj en- kaj elvagoniĝi
**konkeri:** ekhavi per granda penado
**konscii:** bone scii, kio okazas
**kupeo:** aparta ĉambreto por vojaĝantoj en vagono
**luli:** dormigi infanon per ir-reira movado
**milda:** agrable, malakre sentata
**observi:** rigardi kun daŭra atento, por esplori
**paĉjo:** pli bela kaj "varma" vorto por *patro*
**panjo:** pli bela kaj "varma" vorto por *patrino*
**psika:** senta, "mal-korpa"
**racio:** la saĝa, inteligenta parto de la homa penso
**reciproki:** agi, senti aŭ efiki kontraŭ alia homo ĝuste tiel, kiel okazis de la alia kontraŭ oni
**sandviĉo:** manĝaĵo, konsistanta el du pantranĉoj kaj io intermetita
**teda:** ĝena per longa ripetado aŭ daŭro
**tramo:** iam ĉevala, nun elektra veturilo en urboj, kiu iras sur feraj vojoj

*Ami kinon:*

# Apartaĵoj

*facila*

***Apartaĵo de la nacia ĉasado* dum la aŭtuna sezono***
Originala titolo: ***Osobennosti nacionaljnoj oĥoti v osennij period***
(Ruslando, 1995)
Kolora
Reĝisoro*: ***Alekssandr Rogoĝkin***
Ĉef-rol*-uloj: ***Aleksej Buldakov, Viktor Biĉkov, Villi Ĥaapsaallo***

***Islamano****
Originala titolo: ***Musulmanin***
(Ruslando, 1995)
Kolora
Reĝisoro: ***Vladimir Ĥotinenko***
Ĉefroluloj: ***Eŭgenij Mironov, Nina Usatova, Aleksandr Baluev, Evdokija Germanova, Vladimir Ilijn***

Antaŭ kelkaj jaroj la kinarto de Rusio trafis en profundan krizon*. Ni tute ne plu rigardis rusajn filmojn kaj la studioj* komencis fari reklamojn kaj muzik-filmetojn. Ankaŭ kelkajn usonajn filmojn oni faris en Rusio, ekzemple *Goldeneye* (*Orokululo*), *Terminal Velocity* (*Fina rapideco*), *Police Academy 7: Mission to Moscow* (*Policlernejo 7: Misio* en Moskvon*).

En la festa jaro por la monda kino, 1995, la situacio en Rusio komencis sanĝiĝi. La fama rusa reĝisoro Nikita Miĥalkov gajnis Oskaron kaj tia sukceso montras, ke rusoj revenis al la monda batalkampo de kino.

En 1995 la rusa kino kolektis riĉan aron de rimarkindaj filmoj. Pri du el ili, la plej el-staraj laŭ la opinio de grava semajna gazeto *Ogonjok* (*Lumeto*), mi ŝatus rakonti.

La nomo de la unua filmo estas sufiĉe malfacile tradukebla, sed supre mi faris mian provon. Restu trankvilaj ĉiuj naturamikoj, ĉar mortigado de bestoj en tiu ĉi filmo forestas — ja temas pri ĝia "apartaĵo" laŭ rusoj.




*Kolja (centre) kun siaj patrino kaj frato*

Juna finno Rajvo alvenas al Sankt-Peterburgo por pli multe lerni pri la rusa nacia ĉasado, sperti kaj verki libron pri tio. Jam en Finnlando li multe pristudis la caran* ĉasadon de la 19-a jarcento. Tiel komenciĝas la komedio*.

Rajvo kaj lia rusa amiko venas al la arbaro apud sekreta* militaera bazo, kie ĉiujare en la sama tempo, aŭtune, generalo* Petroviĉ kaj pluraj amikoj kunvenas en dometo ĉe arbaristo Kuzmiĉ. La finno miras, ke la ĉasistoj kunprenas multege da vodko* kaj vino kaj nenion pli. La rusoj ja klarigas, ke tiu ĉi estas tiel rusa kutimo. Kaj la kutimo ekas efektiviĝi. Komence la rusoj drinkas* je tio, ke la ĉasado iĝu sukcesa; poste ili drinkas, ĉar doloras la kapo; poste ili vizitas rusan tradician banejon kaj tie ili ne povas ne drinki. Tagon post tago la situacio samas. Ĉiutage Rajvo demandas, ĉu hodiaŭ ni iros al ĉasado aŭ ne? Bedaŭrinde li ricevas nur unu respondon — sidu kaj drinku plu. Certe dufoje la ĉasistoj provis efektivigi la planitan projekton. Ekzemple, unufoje anstataŭ arbarajn bestojn ili misgvide post-kuris bovinon, kiu apartenas al la arbaristo. Post tiuj malsukcesoj la ĉasistoj decidis ne plu serĉi bestojn, sed daŭrigi la antaŭan okupon — feliĉe ili kunhavas sufiĉe da vodko. Tiamaniere Rajvo lernis ne rusan ĉasadon, sed la alian tradician rusan ŝatokupon.





***Reĝisoro Vladimir Ĥotinenko***

***Arbaristo, generalo kaj la juna finno***

La filmo estas plenplena de ŝercoj kaj ridigaj situacioj. Ĉiuj aktoroj* — krom la ege fama Aleksej Buldakov (generalo), kiuj ludis en ĝi, estas nefamaj, tamen bonegaj. Ankaŭ la denaska finno Villi Ĥaapsaallo bonege ludis kaj pro tio la filmo aparte elstaras.

Plej ĝojigas min en tiu ĉi komedio, ke se ĉiuj ĉasistoj ĉasus tiel, la bestoj restus vivaj, la arbaroj plenaj de kreskaĵoj kaj la riveroj plenaj de fiŝoj.

**Vladimir Ĥotinenko** estas nun la plej modernpensema kaj kapabla reĝisoro de la nova rusa kinarto. Pasintjare lia filmo *Makarov* gajnis kelkajn naciajn premiojn Nika — la rusa frato de Oskaro. Oni opinias lin sekvanto de Nikita Miĥalkov. Li same ĝuste malkaŝas la tipan* proprecon de rusoj en siaj filmoj, kaj *Islamano* estas ege neordinara okazaĵo en la moderna rusa kinarto.

La filmo rakontas pri simpla kampara junulo Kolja Ivanov. Li militservis en Afganistano kaj mistrafis en kaptitecon. Feliĉe li revenas al sia denaska vilaĝo viva kaj sana, sed nun li estas "islamano". Kelkfoje tage li preĝas, kaj nek fumas nek drinkas.

En sia vilaĝo li renkontas la malkomprenemon de la najbaroj*, patrino kaj frato. Lia patrino, tute ordinara rusino, kiu neniam preĝis aŭ vizitis preĝejon, eĉ timas sian filon. Kvankam la frato de Kolja estas profunda drinkemulo, li ankaŭ kontraŭas la fraton. La vero, kiun pruvas *Islamano*, estas ĝenerala ĉie tra la mondo — homoj timas ĉion novan kaj nekonatan.

Eŭgenij Mironov estas nova stelulo el la nova aro aktoroj. Li sukcese ludas en teatro, laboras por kino kaj televido. En 1995 oni elektis lin Aktoro de la jaro. Pretiĝante por ludi kiel Kolja-Abdullah, li ofte vizitis la moskvan moskeon*.

La dua grava rolo apartenas al la patrino de Kolja. Tiun ĉi-rolon ludis la bonega aktorino Nina Usatova. Antaŭ du jaroj ŝi estis Aktorino de la jaro. Ŝi estas tute tipa rusino, kia povus esti najbarino aŭ sam-laborej-anino mia. Nina Usatova nun personigas en kino Rusion kaj se vi deziras kompreni la rusan proprecon, rigardu rolojn de tiu ĉi aktorino.

Se estonte Rusio ree provos gajni iun mondan kinpremion, ĝi povos sukcesi per *Islamano*.




**aktoro:** ludanto en filmo aŭ teatraĵo
**cara:** rilata al *caro* (= ŝtatestro de slavaj landoj en malnovaj tempoj)
**ĉasi:** post-kuri, kapti kaj mortigi bestojn
**drinki:** plezuriĝi en la trinkado de vino
**generalo:** supera militista rango
**islamano:** sekvanto de Mahometo
**komedio:** ridiga teatraĵo aŭ filmo
**krizo:** grava danĝera stato
**misio:** grava farendaĵo
**najbaro:** homo, kiu loĝas apude
**moskeo:** *islama* preĝejo
**reĝisoro:** estro de filmo aŭ teatraĵo
**rolo:** tio, kion devas diri kaj fari *aktoro*
**sekreta:** rilata al *sekreto* (= io, kion devas koni neniu aŭ nur kelkaj homoj)
**studio:** film-laborejo
**tipa:** prezentanta en si la proprajn ecojn de iu speco de personoj aŭ objektoj
**vodko:** rusa forta "vino"

# tentaklo

**Viaj reagoj kaj sugestoj estas bonvenaj ĉe nia adreso. La redakcio ne respondecas pri la opinioj de la legantoj.**

## Procentaĵo

Tre amuzis min la pseŭdoscienca (kaj eble ankaŭ pseŭdonima) artikolo de d-ro Lechowski en KONTAKTO 150 (1995:6). Dank' al ĝi mi nun estas je 13,2% pli feliĉa ol antaŭe.

*Ulrich Matthias, Germanio*

***Red.:** La nomo de la verkinto ne estas pseŭdonima. (Dum mia tuta redaktora periodo de pli ol 4 jaroj nur 3 artikoloj kaj unu recenzeto aperis sub pseŭdonimo.)*

## Pigra Julavo

En KONTAKTO n-ro 144 (1994:6) ni legis artikolon pri la Julavo. Ni estas geknaboj ĉirkaŭ 11-jaraj kaj ĉiu el ni skribis leteron laŭ via konsilo. Ni ankoraŭ nenion ricevis kaj tion ni tre bedaŭras. Ĉu ni povas fidi je viaj artikoloj?

*Eperanto-klubo de Collège Condorcel, Francio.*

***Red.:** El fidindaj fontoj ni scias, ke en la oficejo de la Julavo en Rovaniemi oni respondas al leteroj ankaŭ en Esperanto. Verŝajne la koncerna oficisto ne plu deĵoras. Eble vi sendu protestleteron ankaŭ al Julavo, en via nacia lingvo.*

## Koloro

En *tentaklo* de KONTAKTO 150 (1995:6) aperis reago al la bildstrio *Koloro* de la antaŭa numero. Ĝi tuj elvokis malbonajn sentojn en mi. Post refoja legado mi konsciiĝis, kial. La verkinto nomas la montritan evoluon "timiga" ĉar la blankuloj iĝas minoritato, kiu "dronas en amaso tiagrade nigra". Ĉu vere homoj malsamkoloraj estas danĝero en kiun eblas droni?! La reago ja subkomprenigas, ke blankuloj devas certigi sian postvivon kiel raso. Kia profunda rasismo! Tio estas neniel akceptebla, sed malkonstrua kaj danĝera. Krome, tiaj opinioj baziĝas nur sur neracia timo.

Cetere, kio estas "amaso tiagrade nigra"? Kioman gradon da ne-blanko la aŭtoro akceptus kiel (ankoraŭ) ne-timiga?

*S. Ralf Gion Fröhlich, Svedio*

## Kaŝa Niĝerio

Kontraŭreage al la reago pri mia artikolo *Kaŝa Niĝerio* en KONTAKTO 149 (1995:5), mi ne bezonis pli da prudento ol mi efektive havis por verki ĝin — almenaŭ kiel homo, kiu ne estas ano de iu ajn sekreta societo.

Mi penis konsulti PIV-on, kiun mi ne havis dum la verkado de la artikolo, pri la signifo de "framasonismo" kaj "loĝio": *"Framasono: ano de iu kultura societo kun sekretaj ritoj, ekzistanta en multaj landoj kaj celanta la kunhelpon inter siaj membroj kaj ĝenerale la plibonigon de la moraleco, frateco kaj justeco de la socio."* En tiu difino la vortoj, kiuj plej gravas al mi, estas "sekretaj ritoj", praktikataj en la niĝeriaj kaj ĉieaj kaŝaj societoj; miaopinie nenio "sekreta" estas plene bona, kiel oni povus supozi. Kio ajn rita kreas timon en ne-membroj de la koncernaj grupoj. Kaj tio rezultigas socian malsamecon.

La reaginto memoru, ke mi skribis, ke iu ne-membro neniam kapablos rakonti ĉion, kio okazas en la sekretaj societoj. Aliflanke, por konservi la kaŝecon de tiuj societoj, neniu membro dezirus diri la tutan veron pri ili — alie kiel ili plu restus kaŝaj? Tamen, miaopinie ne-inicitoj kapablas pli prudente eltrovi, kion la sekulara mondo bezonas scii pri la kaŝaj societoj, ĉar ili ne havas ligon al la societoj.

Mi ja kredas, ke la loĝioj de la okcidenta kulturo celas fratecon. Ekzakte pri tio temas tiaj societoj ĉie — eĉ se la reaginto malsamopinias. Sed la vero estas, ke nur la anoj ĝuas tiun "celon".

Pri la alinomiĝo en Niĝerio de *ògbóni* komence al *loĝio* kaj *framasonismo* poste kunlaboris alikontinentanoj mem, kiel mi priskribis. La grupoj identigas sin kiel *loĝio* kaj per tio ankaŭ mi identigis ilin. Tiusence la prudentopeto ne estas por mi.

Sed mi tamen deziras kunlabori kun ĉiuj reagantoj pri la temo, se ili pretas helpi Niĝerion en tia problemo, ĉar (antaŭ kaj post la apero de *Kaŝa Niĝerio*) ade perdiĝas homaj vivoj kaj universitataj konstruaĵoj. Vian leteron bv. adresi al la redakcio de KONTAKTO.

*Gabriel Olúbùnmi Òshó-Davies*

## Tre malfacilaj

La estimata "Ido de Sfinkso" verŝajne tro alte taksas nin, kompatindajn homojn. Povas esti, ke ĉe liaj parencoj tiaj krucvortoj estas ordinaraj, sed en KONTAKTO tia tasko meritas ŝildon "malfacila" aŭ eĉ "tre malfacila". Por solvi tiun de KONTAKTO 150 (1995:6) necesis, almenaŭ por mi, kelkoble pli da tempo ol kutime kaj intensa uzo de la vortaro. Apartaj vortoj estis tiom enigmaj... Do, gratulojn al la aŭtoro (kaj al mi)!

*Mihail Ŝelestov, Bjelorusio*

***Red.:** Ni klopodas kontentigi ne nur komencantojn, sed ankaŭ pli progresintajn legantojn (inter kiuj, evidente, vi troviĝas). Tial kelkaj krucvortoj, kiel tiuj de (forpasinta) Sfinksido, postulas pli da tempo en la solvado.*

## Pozitive

Mi ricevas tre pozitivajn reagojn pri *La 100 jaroj de radio* (*KONTAKTO 150, 1995:6*). Interalie ĝi estis citita en elsendo de Pola Radio.

*Bruno Masala, Francio*

## Por Anna

La bildo de Anna Rachoń, kiu akompanas mian poemon *Indignosento* en KONTAKTO 150 (1995:6), estas tre bela kaj oportuna.

*Kaju Bimu Niz, Brazilo*

## Gutoj pri gotoj

En la tre interesa *La lasta triumfanto de la Romia Imperio* de Geoffrey Greatrex (KONTAKTO 151, 1996:1) enestas kelkaj konfuzigaj frazoj pri la religia situacio de la Romia Imperio en la 6-a jc p.K. La aŭtoro menciis pri la antikvaj gotoj, ke *"kvankam ili estis kristanoj, ili ne estis ortodoksaj kristanoj (katolikoj), malkiel la romianoj, kiujn ili regis, kaj kiuj daŭre troviĝis en la orienta imperio".*

Restas neklare: 1-e, ĉu ortodoksaj kristanoj estas katolikoj; 2-e, ĉu romianoj estis ortodoksaj (katolikoj); 3-e, kiu regis kiun kaj kie. Do, ĉu la katolikoj troviĝis en la Orienta Imperio, kaj ĉu la gotoj regis tiujn romianojn en la Orienta Imperio? Ĉu en la Okcidento ne plu loĝis romianoj?

La konfuzon kreas la uzitaj terminoj *ortodoksa* kaj *katolika*. Ortodoksa, en Esperanto kaj en plimulto de la eŭropaj lingvoj havas du signifojn. Laŭ PIV: ***1** Konforma al la tradicia doktrino. **2** Grekrite kristana.* Katolikismon PIV difinas kiel: ***1** (vastasence) La kristana religio, bazita sur la dogmaro kaj ritaro difinitaj de la unuaj sep koncilioj kaj precipe en la kredkonfeso de Niceo. **2** (malvastasence) La kristana religio, bazita sur la dogmaro kaj ritaro difinitaj de ĉuj ĝisnunaj koncilioj...*

Por moderna lingvouzanto nescia pri religia historio certe sonas strange, ke oni egaligas ortodoksajn kristanojn kun katolikoj, ĉar hodiaŭ tiuj terminoj rilatas al du malsamaj kristanaj orientiĝoj, nome la *grekortodoksa* kaj la *romkatolika*. Pri ortodoksaj kaj katolikaj kristanoj oni povas paroli nur post 1054, kiam okazis la definitiva eklezia skismo (ĝis tiu jaro ekzistis nur pluraj ritoj sed la teologiaj dogmoj estis la samaj.)

Pro tiu terminologia konfuzo la leganto ne povas deĉifri, kio fakte estis la gotoj se ili estis nek ortodoksoj nek katolikoj. Greatrex mencias, ke ili estis herezuloj, kaj tio estas prava. La gotoj apartenis al t.n. Ariana herezo, kiu estis kondamnita en la koncilio de Niceo, en 325. La ariana doktrino ne-ortodokse interpretis la dogmon pri la Triunuo, asertante, ke La Filo ne estas identa kun La Patro. (La temo de gotoj, cetere, meritus apartan atenton en iu venonta KONTAKTO, interalie ĉar la tradukinto de la gota Biblio, Vulfilla — t.e. Lupido, estis inter la unuaj planlingvistoj, kiu interalie kreis apartan alfabeton por sia lingvo.) La gotoj migris tra grandaj teritorioj kaj facile miksiĝis kun indiĝenaj popoloj, tiel ke ili estis grava integriga faktoro de la nove ekestiĝanta Eŭropo (post la disfalo de la Okcidenta Romia Imperio). Ili faris nur unu eraron: sekvis la "malĝustan" religion, kaj tio pereigis ilin.

*Nikola Rašić, Nederlando*

Teksto kaj fotoj de *Farbado sur ovoj* en KONTAKTO (151, 1996:1) apartenas al **Macovei Nicolae** el **Rumanio**. Pardonon pro la ellaso!




*Delci Cipriani, Brazilo*

tre facila

# Akvofalo

**Mi, vi — ni!**
**Akvofalo... mi, mi, mi?**
**Falas akvo, falas mi en la penso**
**Vi!**
**Mi!**
**Ni?**
**Falas akvo, falas la tempo.**
**La tago falas.**
**Mi falas en vin.**
**La nokto falas.**
**La akvo faladas.**
**Vi foras.**
**. . . Mi falas!**

*(1992)*